



LA PLEJ
DANGERA
LUDO

RICHARD CONNELL

ESPERAJO

LA PLEJ DANĜERA LUDO

Originala titolo: *The most dangerous game*

Aŭtoro: Richard Connell

Unua publikigo: 1924

Cifereca eldono de Studio Esperaĵo, julio 2021

Tria eldono: februaro 2024

Esperanta traduko: Eriko Demaro

Kompostado kaj revizio: Mikaelo Kastro

Kovrilo: Mikaelo Kastro, 2021

LA PLEJ DANGĜERA LUDO

RICHARD CONNELL

"Tie dekstre – ie – estas granda insulo," diris Whitney. "Estas mistero..."

"Kiu insulo ĝi estas?" Rainsfordo demandis.

"La malnovaj mapoj nomas ĝin «Ŝipkaptil-insulo»,» Whitney respondis. "Alloga nomo, ĉu ne? Maristoj havas kuriozan timegon al la loko. Mi ne scias kial. Ia superstiĉo..."

"Mi ne vidas ĝin," rimarkis Rainsfordo, provante fikse rigardi tra la humida tropika nokto, kies densa varma nigreco estis palpebla, kolizianta kontraŭ la jaĥto.

"Vi havas bonajn okulojn," diris Whitney, ridante, "mi vidis vin trafi de kvarcent jardoj alkon moviĝantan en aŭtune bruna arbusto, sed vi ne eĉ povas vidi pli-malpli kvar mejlojn en senluna Kariba nokto."

"Ne eĉ kvar jardojn," konfesis Rainsfordo. "Aĉ! Estas kiel humida nigra veluro."

"Estos sufiĉe da lumo en Rio," promesis Whitney. "Ni ŝajne alvenos tien post kelkaj tagoj. Mi esperas, ke la por-jaguaraj pafiloj estos de *Purdey*.¹ Ĉasado estos bona en la Amazonio. Bona sporto estas ĉasado."

¹ Brita manufakturo de armiloj.

"La plej bona sporto el la tuta mondo," konsentis Rainsfordo.

"Por la ĉasisto," aldonis Whitney. "Ne por la jaguaro."

"Ne diru sensencaĵojn, Whitney," diris Rainsfordo. "Vi estas ĉasisto de grandbestoj, ne filozofo. Kiu zorgas pri la sentoj de jaguaro?"

"Eble la jaguaro ja zorgas," konsideris Whitney.

"Ba! Ili ne havas tian komprenon."

"Eĉ tiel, mi preferas pensi ke ili komprenas unu aferon – timon. Timon al doloro kaj timon al morto."

"Kia sensencaĵo," ridis Rainsfordo. "Ĉi tiu varmega vetero moligas vin, Whitney. Estu realisto. La mondo estas konstruita el du klasoj: la ĉasistoj kaj la ĉasatoj. Bonŝance vi kaj mi estas ĉasistoj... Ĉu vi pensas ke ni jam preterpasis tiun insulon?"

"Mi ne povas vere scii kun tiom da mallumo. Mi esperas."

"Kial?" demandis Rainsfordo.

"La loko havas reputacion malbonan."

"Kanibaloj?" sugestis Rainsfordo.

"Ne. Eĉ kanibaloj ne loĝus en tia loko forlasita de Dio. Sed ĝi eniris en la maristan folkloron, iel. Ĉu vi ne rimarkis, ke la ŝipanaro ŝajnis nervoza hodiaŭ?"

"Nun, kiam vi mencias tion... ili ja agis iomete strange, jes. Eĉ kapitano Nielsono-"

"Jes, eĉ tiu fortmensa maljuna svedo, kiu irus sola rekte al la diablo kaj petus de li alumeton. Tiuj fiŝaj bluaj okuloj entenis mienon kiun mi neniam antaŭe vidis. Ĉio, kion mi povis eltiri de li estis «Ĉi tiu loko havas malfavoran nomon inter maristoj», kvazaŭ la aero ĉirkaŭ ni estus venena. Nu, vi ne ridu post ol mi diros ĉi tion al vi – mi ja sentis ian subitan malvarmon. Ne estis eĉ venteto. La maro estis plata kiel glaca fenestro. Ni proksimiĝis al la insulo tiam. Tio, kion mi sentis, estis mens... mensa malvarmo; ia subita timego."

"Pura imagaĵo," diris Rainsfordo. "Unu superstiĉa maristo povas korupti la tutan maristaron per sia timo."

"Eble. Sed fojfoje mi pensas, ke maristoj havas kroman senson kiu sciigas ilin pri kiam ili estas en danĝero. Mi iam pensis, ke malboneco estas palpebla – per ondoj, kiel la ondoj de sono kaj lumo. Malbona loko povas, ieldirate, elsendi vibrojn de malboneco. Ĉiukaze, mi ĝojas ke ni eliras de ĉi tiu regiono. Nu, mi pensas ke mi enlitiĝos nun, Rainsfordo."

"Mi ne dormemas," diris Rainsfordo. "Mi fumos unu plian pipon ĉe la pobo."²

² Malantaŭa parto de ŝipo.

"Tiukaze, bonan nokton, Rainsfordo. Ĝis la matenmanĝo."

"Bone. Bonan nokton, Whitney."

Ne ekzistis sono en la nokto dum Rainsfordo sidis tie, krom la febla pulsobatado de la motoro, kiu propulsis la jahton rapide tra la malheleco, kaj la susurado kaj kirlado de la akvo kaŭzita de la helico.

Rainsfordo, apogante sin en brakseĝo, pigre suĉis sian plej ŝatatan eriklignan pipon. La volupta letargio de la nokto influis lin. "Estas tiom malhele," li pensis, "ke mi povus dormi sen fermi la okulojn; la nokto estus miaj palpebroj."

Subita sono surprizis lin. Ĝi venis de ie dekstre, kaj liaj oreloj, kiuj estis spertaj pri tiaj aferoj, ne povis erari. Denove li aŭdis la sonon, kaj denove. Ie en la nigreco, iu pafis per pafilo trifoje.

Rainsfordo eksaltis kaj moviĝis rapide al la balustrado, konsternita. Li streĉis siajn okulojn al la direkto de kie la sonoj venis, sed estis kiel provi vidi tra lana kovrilo. Li saltis sur la balustradon kaj balancis sin tie por plialtiĝi; la pipo, frapanta ŝnuron, falis de lia buŝo. Li etendis la brakon por kapti ĝin.

Mallonga, raŭka krio devenis de lia buŝo kiam li eksciis ke li etendiĝis tro multe kaj perdis ekvilibron. La krio interrompiĝis kiam la varma akvo de la Kariba Maro plaŭdis super lia kapo.

Li naĝe baraktis surfacen kaj provis krei, sed la ŝauma postsigno de la jahto frapis lin en la vizaĝo kaj la sala akvo eniranta lian malfermitan

buŝon sufoketis lin. Senespere li naĝis per fortaj brakmovoj post la forirantaj lumoj de la jaĥto, sed ĉesis antaŭ ol fini kvindek futojn da naĝado. Ia trankvileco venis al li; ne estis la unua fojo en kiu li estis en malfacila situacio.

Estis ŝanco, ke liaj krioj povus esti aŭditaj de iu sur la jaĥto, sed tiu ŝanco estis malgranda kaj ju pli malproksimen la jaĥto foriris, des malpli probabla fariĝis tiu ŝanco. Li demetis siajn vestaĵojn kaj kriis per ĉia potenco en si. La lumoj de la jaĥto iĝis malfortaj kaj ĉiam-malaperantaj lampiroj; tiam ili estis tute nuligitaj pro la nokto.

Rainsfordo rememoris la pafojn. Ili venis de dekstre, kaj obstine li naĝis tiudirekten, naĝante per malrapidaj intencaj brakmovoj, konservante la forton. Dum tempo, kiu ŝajnis al li senfina, li batalis kontraŭ la maro. Li komencis kalkuli siajn brakmovojn; li eble povus fari cent pli kaj tiam...

Rainsfordo aŭdis sonon. Venis el la malheleco laŭta kriego, la sono de besto trafita de angoro kaj teruro.

Li ne rekonis la beston kiu faris la sonon; li ne provis. Kun freŝa vivoforto li naĝis al la sono. Li aŭdis ĝin denove; tiam ĝi estis ĉesigita de alia sono, klara, abrupta.

"Pafo de pistolo," murmuris Rainsfordo sen ĉesi naĝi.

Dek minutoj de rezoluta klopodo alportis alian sonon al liaj oreloj – la plej bonvena, kiun li iam aŭdis – la murmurado kaj batado de la maro kontraŭ ŝtonplena marbordo. Li preskaŭ atingis la ŝtonojn antaŭ ol li vidis ilin. Dum nokto pli maltrankvila, li estus koliziinta kontraŭ la

rokoplerna marbordo. Per sia cetera potenco li trenis sin for de la akvo. Akraj klifoj ŝajnis elstari en la opakeco; li perforte grimpis, movante unu manon post la alia.

Anhelante, kun la manoj nudaj, li atingis platan lokon ĉe la supro de eta krutaĵo. Densa ĝangalo venis rekte ĝis la rando de la klifoj. Rainsfordo ne konsciis tiam kiajn danĝerojn tiu ĥaoso da arboj kaj arbustoj entenis por li. Li nur sciis, ke li estis sekura kontraŭ sia malamiko, la maro, kaj absoluta laceco trafis lin. Li kuŝiĝis ĉe la rando de la ĝangalo kaj rapide falis en la plej profundan dormon de sia vivo.

Kiam li malfermis siajn okulojn li sciis, pro la pozicio de la suno, ke estis malfrue posttagmeze. Dormo revigligis lin; akra malsato pikis lin. Li ĉirkaŭrigardis, preskaŭ ĝoje.

"Tie, kie estas pistolaj pafoj, estas viroj. Tie kie estas viroj, estas manĝaĵo," li pensis. Sed kiaj viroj, li scivolis, povas loĝi en ĉi tiu malpermesata loko? Nerompita fronto de ĝangalo ornamis la marbordon kiel franĝo.

Li vidis neniun signon de vojo tra la strikte trikita reto da herbaĉoj kaj arboj; pli facilis iri laŭ la marbordo. Ne malproksime de kie li eliris el la maro, li haltis.

Iu vundita estaĵo – evidente granda besto – iam eniris en la arbaron; la ĝangalaj herbaĉoj estis platpremitaj kaj la musko estis ŝirita; unu bedo de herbaĉo estis makulita karmezine. Malgranda, brila objekto nemalproksima kaptis la atenton de Rainsfordo, do li levis ĝin. Ĝi estis malplena kartoĉo.

"Dudek du," li rimarkis. "Strange. Ĝi devis esti relative granda besto. La ĉasisto kuraĝis kontraŭi ĝin per malpeza pafilo. Estas klare, ke la besto bone kontraŭbatalis. Mi supozas, ke la unuaj tri pafoj, kiujn mi aŭdis, estis kiam la ĉasisto timigis sian predon kaj vundis ĝin. La lasta pafo estis kiam li portis ĝin al ĉi tie kaj ĝin finmortigis."

Li ekzamenis la grundon atente kaj trovis tion, kion li atendis: spuron de ĉasbotoj. Ili indikis vojon al la klifo al kie li jam iris. Avide li hastis, foje glitante sur putra ŝtupo aŭ malfirma ŝtono, sed daŭre progresante; nokto ekfalis sur la insulon.

Malgaja obskuro nigrigis la maron kaj la ĝangalon kiam Rainsfordo ekvidis lumojn. Li trovis ilin kiam li turnis ĉe kurbo de la marbordo; kaj lia unua penso estis, ke li atingis vilaĝon, ĉar estis multaj lumoj.

Sed post ol li iradis, li vidis, surprizita, ke ĉiuj lumoj venis el unu grandega konstruaĵo: altega strukturo kun pintaj turoj, kiuj ŝajnis tuŝi la nokton. Liaj okuloj ekrekonis la ombrecajn konturojn de grandioza vilao; ĝi estis sur alta krutaĵo, kaj je tri flankoj, klifoj plonĝis al tie, kie la maro lekis siajn voremajn lipojn meze de la ombroj.

"Miraĝo," pensis Rainsfordo. Sed li trovis ke ne estis miraĝo, kiam li malfermis la altan pordegon. La ŝtonaj ŝtupoj sufiĉe realis; la granda pordo kun pordofrapilo en la formo de malicrigardanta gargojlo estis ankaŭ sufiĉe reala; sed super ĉio pendis aero de nerealeco.

Li levis la frapilon, kaj ĝi grincis³ rigide kvazaŭ ĝi neniam antaŭe estis uzita. Li lasis ĝin fali, kaj ĝi timigis lin pro sia metala laŭteco. Li pensis,

³ Eligi akran malagrablan sonon pro kunfrotiĝo.

ke li aŭdis paŝojn ene, sed la pordo restis fermata. Denove Rainsfordo levis la pezan pordofrapilon, kaj lasis ĝin fali. La pordo malfermiĝis tiam – malfermiĝis subite, kvazaŭ aktivigita per risorto – kaj Rainsfordo staris palpebrumante antaŭ la fluo de brila ora lumo, kiu ĵus elverŝiĝis.

La unua aĵo, kiun la okuloj de Rainsfordo perceptis, estis la plej alta viro, kiun Rainsfordo iam ajn vidis – giganta homo, fortika kaj kun nigra barbo ĝis la talio. La viro tenis en siaj manoj revolveron kun longa paftubo, kaj li direktis ĝin rekte al la koro de Rainsfordo.

El la barba vepro, du malgrandaj okuloj rigardis Rainsfordon.

"Ne maltrakviliĝu," diris Rainsfordo, kun rideto per kiu li provis trankviligi la viron. "Mi estas neniu ŝtelisto. Mi falis de jaĥto. Mia nomo estas Sangero Rainsfordo, el Novjorko."

La minaca mieno ne ŝanĝiĝis. La revolvero restis rigida kvazaŭ la giganto estis statuo. Li ne indikis, ke li komprenis la vortojn de Rainsfordo, aŭ ke li eĉ aŭdis ilin. Li portis nigran uniformon sub griza astrakana⁴ mantelo.

"Mi nomiĝas Sangero Rainsfordo, el Novjorko," Rainsfordo komencis denove. "Mi falis de jaĥto. Mi malsatas."

La nura respondo de la viro estis levi la revolver ĉanon per la dikfingro. Tiam Rainsfordo vidis, ke la libera mano leviĝis al lia frunto por fari militistan saluton. La giganto klakis siajn kalkanumojn kune kaj staris atente. Alia viro venis malsupren laŭ la marmora ŝtuparo: rekta kaj

⁴ Altvalora felo de novnaskita ŝafido.

magra viro portanta vesperajn vestaĵojn. Li iris al Rainsfordo kaj etendis sian manon antaŭ li.

Kun klera voĉo markita de milda akĉento, kiu aldonis al sia parolado precizecon kaj prudenton, li diris:

"Estas ega plezuro kaj honoro bonveni sinjoron Saŝero Rainsfordo, la fama ĉasisto, en mia hejmo."

Aŭtomate Rainsfordo premis la manon de la viro.

"Fakte, mi legis vian libron pri ĉasado de neĝleopardoj en Tibeto," eksplikis la viro. "Mi estas generalo Zarfofo."

La unua impresio estis ke la viro estis strange bela; la dua estis, ke ekzistis originala, preskaŭ bizara eco en la vizaĝo de la generalo. Li estis alta viro, pli aĝa ol mezaĝa, ĉar sia hararo estis hele blanka, sed siaj dikaj brovoj kaj pinta militista liphararo estis tiel nigraj kiel la nokto, en kiu Rainsfordo venis en la insulon. Liaj okuloj estis ankaŭ nigraj kaj ege brilaj. Li havis altajn vangostojn, akran nazon kaj sobran, obskuran vizaĝon. Ĝi estis la vizaĝo de viro kiu kutimis ordoni, la vizaĝo de aristokrato. Turnante sin al la uniformita giganto, la generalo faris signalon. La giganto retiris la pistolon, salutis, kaj foriris.

"Ivano estas nekredeble forta ulo," rimarkis la generalo, "sed li malbonŝance estas surda kaj muta. Li, kiel sia raso, estas simpla ulo kaj, bedaŭrinde, iomete sovaĝa."

"Ĉu li estas ruso?"

"Li estas kozako," diris la generalo. Lia rideto montris ruĝajn lipojn kaj pintajn dentojn. "Ankaŭ mi estas."

"Venu kun mi," li diris, "ni ne devus babilu ĉi tie. Ni povos paroli poste. Nun vi volas vestojn, manĝaĵon, ripozon. Vi havu ilin."

Ivano reaperis, kaj la generalo parolis al li movante la lipojn, sed ili eligis neniun sonon.

"Bonvolu sekvi Ivanon, sinjoro Rainsfordo," diris la generalo. "Mi estis vespermanĝonta kiam vi alvenis. Mi atendas vin. Vi trovos, ke miaj vestoj taŭgas por vi, mi pensas."

Rainsfordo sekvis la silentan giganton al grandega, traboplafona ĉambro kun baldakena lito sufiĉe granda por ses homoj. Ivano aranĝis vesperan veston kaj Rainsfordo, post surmeti ĝin, rimarkis ke ĝi venis de Londona tajloro kiu ordinaro kudris por neniuj sub la rango de duko.

La manĝoĉambro al kie Ivano kondukis lin estis rimarkinda pro multaj aspektoj. Estis mezepoka grandiozeco en ĝi; ĝi sugestis baronan halon de feŭdaj tempoj kun siaj kverkaj paneloj, altaj plafonoj, kaj vastaj tabloj kie kvardek homoj povus sidiĝi por manĝi. Ĉe la muroj estis kapoj de multaj bestoj – leonoj, tigroj, elefantoj, alkoj, ursoj – pli grandaj kaj perfektaj specimenoj ol tiuj, kiujn Rainsfordo iam ajn vidis. La generalo estis ĉe la granda tablo, sola.

"Vi havu koktelon, sinjoro Rainsfordo," li sugestis. La koktelo estis ege bongusta, kaj Rainsfordo rimarkis ke la manĝilaro estis la plej bona – la tolaĵoj, la kristaloj, la arĝentaĵoj, la porcelanaĵoj.

Ili manĝis barĉon – la peza ruĝa supo kun batita kremo, kiu estis tiel kara al rusaj palatoj. Duonbedaŭrante, Generalo Zarfo diris, "Ni faras nian plejblon por konservi agrablajn de civilizacio tie ĉi. Bonvolu pardoni ajnajn mankojn. Ni estas tre izolitaj, ĉu ne? Ĉu vi pensas ke la ĉampano suferis pro tiom longa marvojaĝo?"

"Eĉ ne iomete," deklaris Rainsfordo. Li perceptis tion, ke la generalo estis tre pensema kaj afabla gastiganto; vera kosmopolito. Sed estis unu malgranda trajto de la generalo kiu malkomfortigis Rainsfordon. Ĉiam, kiam li rigardis supren de la plado, li trovis ke la generalo fiksrigardis lin, taksanta lin precize.

"Eble," diris generalo Zarfo, "vi surpriziĝis pro ke mi rekonis vian nomon. Nu, mi legis ĉiujn librojn pri ĉasado publikigitajn en la angla, la franca kaj la rusa. Mi havas neniun pasion krom unu en mia vivo, sinjoro Rainsfordo, kaj tio estas ĉasado."

"Vi havas mirindajn bestokapojn ĉi tie," diris Rainsfordo dum li manĝis bifstekon, kiu estis speciale bone kuirita. "Tiu Kaba bubalo estas la plej granda, kiun mi iam vidis."

"Ho, tiu besto. Jes, ĝi estis monstro."

"Ĉu ĝi atakis vin?"

"Ĝi ĵetis min kontraŭ arbon," diris la generalo. "Frakturiĝetis mia kranio. Sed mi akiris la beston."

"Mi ĉiam pensis," diris Rainsfordo, "ke la Kaba bubalo estas la plej danĝera el ĉiuj grandaj ĉasaĵoj."

Dum unu momento la generalo ne respondis; li montris sian kuriozan ruĝlipan rideton. Tiam li diris malrapide, "Ne. Vi malpravas, sinjoro. La Kaba bubalo ne estas la plej danĝera granda ĉasaĵo." Li trinketis sian vinon. "Ĉi tie, en mia konservejo en ĉi tiu insulo," li diris en la sama malrapida ritmo, "mi ĉasas pli danĝerajn bestojn."

Rainsfordo esprimis sian surprizon, "Ĉu ekzistas iu ĉasaĵo en ĉi tiu insulo?"

La generalo kapjesis. "La plej granda."

"Ĉu vere?"

"Ho, ĝi ne venas ĉi tien nature, kompreneble. Mi devas reprovizi la insulon de tempo al tempo."

"Kion vi importis, generalo?" Rainsfordo demandis. "Ĉu tigrojn?"

La generalo ridetis. "Ne," li diris. "Mia intereso je tigroĉasado ĉesis antaŭ iom da jaroj. Mi elĉerpis iliajn eblojn, verdire. Tigroj ne plu ekscitas min, restas nenia vera danĝero. Mi vivas por danĝero, sinjoro Rainsfordo."

La generalo prenis el sia poŝo oran cigaredujon kaj proponis al sia gasto longan nigran cigaredon kun arĝenta pinto; ĝi estis parfumita kaj odoris je incenso.

"Ni bonege ĉasos, vi kaj mi," diris la generalo. "Feliĉigos min havi vian kompanion."

"Sed kiu ĉasaĵo..." komencis Rainsfordo.

"Mi sciigos vin," diris la generalo. "Vi amuziĝos, mi jam certas. Mi pensas ke mi diros, modeste, ke mi faris raran aferon. Mi inventis novan sensacion. Ĉu mi rajtas replenigi vian kalikon per portovino?"

"Dankon, generalo."

La generalo plenigis ambaŭ kalikojn, kaj diris, "Dio igas iujn virojn esti poetoj. Iujn li igas esti registoj, kaj iujn li igas esti almozuloj. Li igis min esti ĉasisto. Miaj manoj fariĝis por premi la ellasilon, diris mia patro. Li estis ege riĉa viro kun milionkvarono da akreoj en Krimeo, kaj estis fervora sportisto. Kiam mi aĝis nur kvin jarojn li donis al mi etan pafilon, speciale farita por pafi paserojn. Kiam mi trafis iujn el liaj altvaloraj meleagroj per ĝi, li ne punis min; li komplimentis min pri mia lerteco je pafado. Mi mortigis mian unuan urson en Kaŭkazio kiam mi aĝis dek jarojn. Mia tuta vivo estis unu longdaŭra ĉaso. Mi aliĝis al la armeo – tia ago estis atendata de ĉiu filo de nobelo – kaj dumtempe komandis divizion de la Kosaka kavalerio, sed mia vera intereso estis ĉiam la ĉasado. Mi ĉasis ĉiun tipon de besto en ĉiu lando. Ne eblas diri al vi kiom da bestoj mi mortigis."

La generalo suĉis sian cigaredon.

"Post la fiasko en Rusio, mi foriris de la lando, ĉar estis malprudente por oficioj de la Caro resti tie. Multaj nobelaj rusoj perdis ĉion. Mi,

bonŝance, investis peze en usonaj akcioj, do mi neniam estis devigita malfermi teejon en Montekarlo aŭ stiri taksion en Parizo. Nature mi ĉasadis – brunajn ursojn en via usona Rokmontaro, krokodilojn en la rivero Gango, rinocerojn en Orienta Afriko. Estis en Afriko kie la Kaba bubalo frapegis min. Tio kaŭzis al mi ses-monatan ripozon. Tuj post mia resaniĝo, mi iris al Amazono por ĉasi jaguarojn, ĉar mi aŭdis ke ili estis ege ruzaj... Sed ili ne estis ruzaj."

La Kozako suspiris. "Ili tute ne estis defio por sperta ĉasisto kaj potenca fusilo. Mi amare seniluziĝis. Iunokte mi kuŝis en mia tendo kun kapdolorego, kiam terura penso enrompis en mian menson. Ĉasado ekenuigis min! Kaj ĉasado, memoru, estis mia tuta vivo. Mi aŭdis, ke negocistoj en Usono ofte freneziĝas kiam ili forlasas la firmaon, kiu estis sia vivo."

"Jes, tio ĝustas," diris Rainsfordo.

La generalo ridetis. "Mi ne deziris freneziĝi," li diris. "Mi devis fari ion. Nu, la mia estas analitika menso, S-ro Rainsfordo. Sendube tio estas kial mi ĝuas la problemojn de la ĉaso."

"Sendube, Generalo Zarofa."

"Do," daŭrigis la generalo, "mi demandis min kial ĉasado ne plu fascinis min. Vi estas ege pli juna ol mi, sinjoro Rainsfordo, kaj vi ne ĉasis multe, sed eble vi povus konjekti la respondon."

"Kio estis?"

"Simple ĉi tio: ĉasado ĉesis esti tio, kion vi nomas «sporta defio». Ĝi iĝis tro facila. Mi ĉiam trafis mian predon. Ĉiam. Ne ekzistas pli enuiga afero ol perfekteco."

La generalo ekbruligis novan cigaredon.

"Neniu besto havis ian ŝancon kontraŭ mi. Tio estas neniu fanfaronado; estas matematika certeco. La besto fariĝas nenio krom gamboj kaj instinktoj. Instinkto estas nenia rivalo kontraŭ racio. Kiam mi ekpensis tion, estis tragedia momento por mi, vere."

Rainsfordo apogis sin sur la tablo, absorbita de tio, kion sia gastiganto diris.

"Tio, kion mi devis fari, venis al mi kiel inspiro," la generalo pluparolis.

"Kaj kio estis tio?"

La generalo montris la silentan rideton de tiu, kiu iam alfrontis obstaklon kaj sukcese venkis. "Mi elpensis novan beston por ĉasi ĝin," li diris.

"Elpensi novan beston? Vi ŝercas."

"Tute ne," diris la generalo. "Mi neniam ŝercas pri ĉasado. Mi bezonis novan beston. Mi trovis unu. Do mi aĉetis ĉi tiun insulon, konstruis ĉi tiun domon, kaj ĉi tie mi faras mian ĉasadon. La insulo estas perfekta por miaj celoj; estas ĝangaloj entenantaj labirinton da padoj, montetoj, marĉoj..."

"Sed, Generalo Zarofo, kian beston?"

"Ho," diris la generalo, "Ĝi donas al mi la plej fascinan ĉasadon el la mondo. Neniu alia ĉaso estas komparebla kun ĝi, ne eĉ iomete. Ĉiutage mi ĉasas, kaj mi neniam enuas nun, ĉar mi havas predon kiu povas kongrui kun mia sprito."

La perplekseco de Rainsfordo montriĝis vizaĝe.

"Mi volis la idealan beston por ĉasi," eksplikis la generalo. "Do mi diris al mi mem, «kiuj estas la trajtoj de ideala predo?». Kaj la respondo estis, kompreneble, «ĝi devas havi kuraĝon, ruzecon, kaj super ĉio, devas havi racion»."

"Sed neniu besto povas havi racion," kontraŭis Rainsfordo.

"Mia kara kolego," diris la generalo, "estas unu, kiu povas."

"Sed vi ne povas intenci..." anhelis Rainsfordo.

"Kaj kial ne?"

"Mi ne povas kredi, ke vi serioze parolas, generalo Zarofo. Ĉi tio estas malbelega ŝerco."

"Kial mi ne devus paroli serioze? Mi parolas pri ĉasado."

"Ĉasado? Ho, Generalo Zarofo, vi parolas pri murdo."

La generalo ridis afable. Li rigardis Rainsfordon demandeme. "Mi rifuzas kredi ke vi, kiu ŝajnas tiel moderna kaj civilizita juna viro, subtenas tiujn romantikajn ideojn pri la valoro de homa vivo. Certe viaj spertoj en la milito..."

"Ne igis min toleri malvarmsangan murdon."

Rido trafis la generalon. "Kiel eksterordinare amuza vi estas!" li diris. "Oni ne atendas nuntempe trovi kleran junan viron, eĉ en Usono, kiu havas tiun naivan – kaj eĉ Viktorinan – vidpunkton. Estas kiel trovi skatoleton da snuftabako en limuzino... Ho, nu, sendube vi havas puritanajn prapatrojn. Multaj usonanoj havas, ŝajne. Mi suspektas, ke vi forgesos viajn principojn kiam vi ĉasos kun mi. Atendas vin novega sento neniam antaŭe spertata, sinjoro Rainsfordo."

"Dankon, sed mi estas ĉasisto, ne murdisto."

"Ho ve," diris la generalo tre trankvile, "denove tiu malagrabra vorto. Sed mi pensas ke mi povas montri al vi, ke viaj skrupuloj estas sufiĉe senbazaj."

"Kiel?"

"Vivo estas por la fortaj, por ke la fortuloj ĝuu ĝin, kaj se estas bezonate, por ke la fortuloj forprenu ĝin. La malfortuloj de la mondo estis metitaj ĉi tien por doni al la fortuloj plezuron. Mi estas forta. Kial mi ne devas uzi mian donacon? Se mi volus ĉasi, kial mi ne devus? Mi ĉasas la feĉon de la mondo: maristojn de vagŝipoj. Orientazianojn, nigrulojn, ĉinojn,

blankulojn, mikstrasulojn... pursanga ĉevalo aŭ hundo valoras pli multe ol ili."

"Sed ili estas homoj," diris Rainsfordo kolere.

"Precize," diris la generalo. "Tial mi uzas ilin. Tio donas al mi plezuron. Ili havas racion, iele-trapele. Do ili prezentas danĝeron por mi."

"Sed de kie vi akiras ilin?"

La maldekstra palpebro de la generalo flirtis malsupren, kiel palpebrumo. "Ĉi tiu insulo nomiĝas «Ŝipkaptil-insulo»,⁵ li respondis. "Kelkafoje, kolera dio de la maro sendas ilin al mi. Kelkafoje, kiam Fortuno ne tiom afablas, mi helpas Fortunon iomete. Venu al la fenestro kun mi."

Rainsfordo iris al la fenestro kaj rigardis maren.

"Jen! Ĝuste tie!" ekkriis la generalo, indikante fingre en la nokton. La okuloj de Rainsfordo nur vidis nigrecon, kaj tiam, kiam la generalo premis butonon, fore en la maro Rainsfordo vidis la ekbrilon de lumoj.

La generalo eligis rikanon.⁵ "Ili indikas kanalon," li diris, "kie neniu kanalo ekzistas. Grandegaj akraj ŝtonoj atendas kiel mara monstro kun faŭko malfermita. Ili povus frakasi ŝipon tiel facile, kiel mi povas frakasi ĉi tiun nukson." Li faligis nukson sur la lignan plankon kaj pistis ĝin per la piedo. "Ho, jes," li diris, indifere, kvazaŭ respondante demandon, "mi havas elektron en la insulo. Oni provas esti civilizita ĉi tie."

"Civilizita? Kaj vi pafmortigas homojn?"

⁵ Malica akresona rido.

Spuro de kolero estiĝis en la okuloj de la generalo, sed ĝi nur estis tie dum unu sekundo; kaj li diris, en sia plej afabla maniero, "Ho ve, kiel justa juna viro vi estas! Mi certigas vin, ke mi ne faras tion, kion vi sugestas. Tio estus barbaraĵo. Mi traktas ĉi tiujn vizitantojn tute respektive. Ili havas multe da manĝaĵo. Ili akiras bonegan korpan staton. Vi mem vidos tion morgaŭ."

"Kion vi celas diri?"

"Ni vizitos mian trejnejon," ridetis la generalo. "Ĝi estas en la kelo. Mi havas proksimume dek du gastojn tie ĉimomente. Ili venis de la hispania barko *San Lucar*, kiu malbonŝance iris al la ŝtonegoj. Tre malsupera grupo, bedaŭrinde. Kompatindaj specimenoj, pli al kutimiĝintaj al ferdeko ol al ĝangalo." Li levis sian manon, kaj Ivano, kiu servis kiel kelnero, kunportis densan turkan kafon. Rainsfordo klopodis por resti bonhumora.

"Estas ludo, verdire," daŭris la generalo banale. "Mi sugestas al unu el ili iri ĉasi. Mi donas al li provizon de manĝaĵo kaj superban ĉastranĉilon. Mi donas al li tri-horan avantaĝon. Poste mi sekvas lin, armita per nur pistolo de la plej malgranda kalibro kaj atingopovo. Se mia predo evitas min dum tri tutaj tagoj, tiam li venkas. Se mi trovas lin," la generalo ridetis, "li perdas."

"Kio okazus se tiu homo rifuzas esti ĉasita?"

"Ho," diris la generalo, "Mi donas al li alian alternativon, kompreneble. Li ne devas ludi tiun ludon se li ne volas. Se li ne volas ĉasi, mi donas lin al

Ivano, kiu havis la honoron iam servi kiel punisto por la grandioza caro Aleksandro la 3-a, kaj li havas siajn proprajn ideojn pri kio estas sporto. Ĉiufoje, sinjoro Rainsfordo, ĉiufoje ili elektas ĉasi."

"Kaj se ili venkas?"

La rideto sur la vizaĝo de la generalo plilarĝiĝis. "Ĝis nun mi neniam perdis," li diris. Tiam li haste aldonis: "Mi ne esperas, ke vi konsideru min kiel fanfaronulon, sinjoro Rainsfordo. Multaj el tiuj predoj estas nur la plej rudimenta speco de problemo. Fojfoje mi ricevas pli ol tio, kion mi atendis. Unu ja preskaŭ venkis. Mi finfine devis uzi la hundojn."

"La hundojn?"

"Venu ĉi-vojen, bonvole. Mi montros al vi."

La generalo direktis Rainsfordon al la fenestro. La lumoj el la fenestroj sendis flagretantan lumadon, kiu kreis groteskajn desegnojn sur la korto, kaj Rainsfordo povis vidi ke estis dekduo da formoj vagantaj. Kiam ili turniĝis al lia direkto, iliaj okuloj brilis verde.

"Sufiĉe bona aro, mi pensas", konsideris la generalo. "Ili estas ellasitaj je la sepa ĉiunokte. Se iu provus eniri mian domon – aŭ eliri – tiam io ege bedaŭrinda okazus al tiu." Li zumis parton de kanteto.

"Kaj nun," diris la generalo, "Mi volas montri al vi mian novan kolekton de kapoj. Ĉu vi irus kun mi al la biblioteko?"

"Mi esperas," diris Rainsfordo, "ke vi pardonu min ĉi-nokte, generalo Zarfo. Mi ne sentas min tro bone."

"Ho, ĉu vere?" La generalo demandis maltrankvile. "Nu, mi supozas ke tio naturas post via longa naĝado. Vi bezonas bonan ripozon, kaj trankvilan nokton por dormi. Morgaŭ vi sentos vin kiel nova viro, mi vetas. Tiam ni iros ĉasi, ĉu ne? Mi havas unu kandidaton relative promesplenan..." Rainsfordo hastis el la ĉambro.

"Mi bedaŭras ke vi ne povas veni kun mi ĉi-nokte," vokis la generalo. "Mi anticipas sufiĉe bonan sportsesion kontraŭ granda kaj forta nigrulo. Li aspektas rimedoplena. Nu, bonan nokton, sinjoro Rainsfordo; mi esperas ke vi havos bonan nokton de ripozo."

La lito estis bona, la piĝamo estis el la plej glata silko, kaj li estis lacega en ĉiu fibro de lia korpo, tamen Rainsfordo ne povis kvietigi sian cerbon per la opio de dormo. Li kuŝis, kun la okuloj plene malfermitaj. Foje li pensis ke li aŭdis malfortajn paŝojn en la koridoro ekster la ĉambro. Li celis subite malfermi la pordon sed ĝi ne povis malfermiĝi.

Li iris al la fenestro kaj elrigardis. La ĉambro troviĝis en unu el la altaj turoj. La lumoj de la vilao nun estis elŝaltitaj, kaj estis malhele kaj silente; sed ja estis pecoj de pala luno, kaj per ĝia milda lumo li povis vidi, meze de la nokto, la korton. Tie, vagante, la desegno de ombroj estis nigraj, sensonaj formoj; la hundoj aŭdis lin ĉe la fenestro kaj rigardis supren per siaj verdaj okuloj. Rainsfordo reenlitiĝis. Per multaj metodoj li provis endormiĝi. Li finfine sukcesis dormi kiam, antaŭ la aŭroro, li aŭdis la feblan sonon de pistolo venantan el la ĝangalo.

Generalo Zarfo ne aperis denove ĝis la tagmanĝo. Li estis vestita neriproĉinde en tvidoj propraj de bienposedanto. Li zorgis pri la stato de la sano de Rainsfordo.

"Rilate al mi," suspiris la generalo, "mi ne sentas min tiom bone. Mi maltrakvilas, sinjoro Rainsfordo. Pasintnokte mi retrovis spurojn de mia longtempa plendo."

Al la demandema ekrigardo de Rainsfordo, la generalo diris, "*Ennui*. Enuo, latine."

Tiam, prenante duan porcion de krespoj, la generalo eksplikis: "La ĉaso ne estis bona pasintnokte. La ulo perdis la kandelon el la kapo. Li kuris laŭ rekta linio, kiu donis neniun problemon al mi." Tio estas mia ĉagreno kun ĉi tiuj maristoj; ili havas malklerajn cerbojn komence, kaj ili ne scias kiel iri tra la arbaro. Ili faras tro stultajn kaj evidentajn movojn. Tio min enuigas. Ĉu vi volas alian glason da *Chablis*,⁶ sinjoro Rainsfordo?"

"Generalo," diris Rainsfordo firme, "mi esperas tuje foriri de ĉi tiu insulo."

La generalo levis siajn densajn brovojn; li ŝajnis ofendita. "Sed, mia kara kolego," la generalo protestis, "vi ĵus alvenis. Vi ne jam ĉas-"

"Mi esperas foriri hodiaŭ," diris Rainsfordo. Li vidis la sententigitajn nigrajn okulojn de la generalo, kiuj ekzamenis lin. La vizaĝo de generalo Zarfo subite pligajiĝis.

⁶ Burgonja blanka vino.

Li plenigis la glason de Rainsfordo per malnova vino *Chablis* el polva botelo.

"Ĉi-nokte," diris la generalo, "Ni ĉasos, vi kaj mi."

Rainsfordo kapneis. "Ne, generalo," li diris. "Mi ne ĉasos."

La generalo levis la ŝultrojn kaj delikate manĝis vinberon. "Laŭ via peto, mia amiko," li diris. "La elekto dependas tute de vi. Sed ĉu mi ne riskus diveni, ke vi trovos mian ideon de sporto pli amuza ol tiun de Ivano?"

Li kapindikis al la angulo de la ĉambro, kie la giganto staris paŭtanta, kun siaj dikaj brakoj krucitaj sur la granda brusto.

"Vi ne celas diri..." kriis Rainsfordo.

"Mia kara kolego," diris la generalo, "ĉu mi ne diris al vi, ke mi ĉiam parolas serioze pri ĉio, kio rilatas al ĉasado? Ĉi tio vere estas inspiro. Mi trinkas toste kontraŭulon indan de mia ŝtalo. Finfine." La generalo levis sian glason, sed Rainsfordo sidis tie, rigardante la generalon.

"Vi trovos, ke indas ludi ĉi tiun ludon," la generalo diris entuziasme. "Via cerbo kontraŭ la mia. Via arbara mastrumado kontraŭ la mia. Via forto kaj vikleco kontraŭ la miaj. Eksterdoma ŝako! Kaj la veto ne restos sen premio, ĉu ne?"

"Se mi venkas..." komencis Rainsfordo raŭke.

"Mi gaje konfesos mian malvenkon se mi ne trovas vin antaŭ meznokto de la tria tago," diris generalo Zarfofo. "Mia ŝalupo alportos vin al la plej

proksima urbo en la kontinento." La generalo antaŭvidis tion, kion Rainsfordo pensis.

"Ho, vi povas fidi min," pludiris la kozako. "Mi donos al vi mian vorton kiel sinjoro kaj sportisto. Komprenble vi, laŭvice, devas konsenti diri nenion pri via vizito al ĉi tiu loko."

"Mi konsentos nenion tian," diris Rainsfordo.

"Ho," diris la generalo, "sed kial diskuti tion nun? Post tri tagoj ni povos debati tion apud botelo de bona ĉampano, krom se..."

La generalo trinketis sian vinon.

Tiam negoca aero vigligis lin. "Mia fidela Ivano," li diris al Rainsfordo, "provizos vin per ĉasvestoj, manĝaĵo kaj tranĉilo. Mi sugestas al vi kunporti mokasenojn; ili lasas malpli evidentajn spurojn. Mi sugestas, ankaŭ, ke vi evitu la grandan marĉon en la sudorienta parto de la insulo. Ni nomas ĝin «la marĉo de morto». Tie estas flusablo. Stultulo unufoje provis eniri. La ĉagrena rezulto de tio, estis ke Lazaro postiris lin. Vi povas imagi kiel mi sentis min, sinjoro Rainsfordo. Mi ŝategis Lazaron; li estis la plej bona hundo el mia hundaro. Nu, mi devas peti ke vi pardonu min nun. Mi ĉiam dormetas post tagmanĝo. Vi apenaŭ havos tempon por dormeti, bedaŭrinde. Vi devos ekiri, sendube. Mi ne sekvos vin ĝis la krepusko. Ĉasi dum nokto estas multe pli interese ol ĉasi dum la tago, ĉu vi ne konsentas? Ĝis la revido, sinjoro Rainsfordo, *au revoir*. Generalo Zarofo, kun profunda riverenco, iris el la ĉambro.

El alia pordo venis Ivano. Sub unu brako li alportis kakiajn ĉasvestaĵojn, dorsosakon da manĝaĵo kaj ledan ingon, kiu enhavis ĉastranĉilon kun

longa klingo. Per la dekstra mano li tuŝis revolveron, kiu estis metita en karmezina zono, kiun li portis ĉirkaŭ sia talio.

Rainsfordo piediris tra la arbaro du horojn. "Mi devas resti trankvila. Mi devas resti trankvila," li diradis dum li kunpremis la dentojn.

Li ne tute estis lucida kiam la pordegoj de la biendomo malfermiĝis. Lia ideo estis unue krei distancon inter li kaj generalo Zarof; kaj por ĉi tiu celo li tute eniris la arbaron, stimulita de la akraj sentoj de io vere simila al paniko. Nun li provis regi sin, haltis, kaj rejuĝis sin kaj sian situacion. Li vidis, ke la rekta fuĝo estis vana; neeviteble tio devigus lin fronti la maron. Li estis ĉirkaŭita de akvo, kaj liaj operacoj, klare, devas okazi ene de tiu kadro.

"Mi donos al li spuron sekvendan," murmuris Rainsfordo deviante de la kruda vojo, kiun li sekvis, kaj eniris en la nespureblan sovaĝejon. Li faris serion da kompleksaj cirkloj; kaj li turnis sin laŭ la vojo denove kaj denove, rememorante ĉiun folkloron pri vulpoĉaso, kaj ĉiun ruzaĵon de la vulpo.

Nokte li laciĝis, kun manoj kaj vizaĝo vipitaj de la branĉoj, en densa rando. Li sciis, ke estus freneze iri tra la mallumeco, eĉ se li havis la sufiĉan forton. Lia bezono ripozi estis imperativa kaj li pensis, "mi agis kiel vulpo, mi nun devas agi kiel kato."

Granda arbo kun dika trunko kaj vastaj branĉoj estis proksima, kaj, zorgeme, por ne lasi spurojn, li grimpis sur ĝin ĝis la akselo, kaj streĉante sian korpon sur unu el la vastaj branĉoj, iele-trapele, ripozis. Ripozo donis al li memfidon kaj preskaŭ senton de sekureco. Eĉ tiel fervora

ĉasisto kiel generalo Zarfo ne povus spuri lin ĝis tie, li diris al si; nur la diablo mem povus sekvi tiun komplikan spuron tra la ĝangalo post krepusko. Sed eble la generalo ja estis diablo.

Tiu maltrankvila nokto pasis malrapide kiel vundita serpento, kaj dormo ne vizitis Rainsfordon, eĉ kiam la silento de morta mondo estis en la ĝangalo. Matene, kiam malpura grizo pentris la ĉielon, la krio de iuj timigitaj birdoj koncentris la atenton de Rainsfordo tiudirekten. Io venis tra la arbustoj, lante, zorgeme. Li alkroĉiĝis al la branĉo kaj, tra kurteno de folioj preskaŭ tiel densa kiel tapeto, li spektis. Tiu, kiu alvenis estis viro.

Estis generalo Zarfo. Li iradis laŭvoje. Liaj nigraj okuloj fiksitaj kun plejbla koncentro al la grundo antaŭ li. Li paŭzis, preskaŭ sub la arbo, surgenuiĝis kaj studis la grundon. La unua impulso de Rainsfordo estis ĵeti sin malsupren kiel pantero, sed li vidis ke la dekstra mano de la generalo tenis ion: malgrandan aŭtomatan pistolon.

La ĉasisto kapneis, iom konfuzita. Li stariĝis kaj eligis unu nigran cigaredon el sia cigaredujo; ĝia pika incensa fumo iris al la naztruo de Rainsfordo.

Rainsfordo tenis sian spiron. La rigardo de la generalo foriris de la grundo kaj vojaĝis tra la arboj. Rainsfordo restis tie. Ĉiuj liaj muskoloj pretis por salto. Sed la lertaj okuloj de la ĉasisto haltis antaŭ ol ili atingis la branĉon kie Rainsfordo kuŝis. Rideto aperis en lia vizaĝo. Tre intence li blovis fumringon en la aeron; tiam li turnis sian dorson kontraŭ la arbo kaj marŝis senzorgeme foren, ree laŭ la vojo de kie li venis. La susuro de la arbustaro fariĝis pli kaj pli febla.

La tenita aero brulis varme el la pulmoj de Rainsfordo. Lia unua penso malsanigis lin kaj tristigis lin. La generalo povis sekvi spurojn tra la arbaro dum nokto; li povis sekvi ege malfacilan spuron; li devis havi mirindajn povojn; nur pro la plej malgranda ŝanco la kozako malsukcesis vidi sian predon.

La dua penso de Rainsfordo estis eĉ pli terura. Ĝi sendis ekstremon de malvarma hororo tra lia tuta esteco. Kial la generalo ridetis? Kial li retroiris?

Rainsfordo ne volis kredi tion, kion sia racio diris al li, sed la vero estis tiel evidenta kiel la suno kiu ekaperis tra la matenaj nuboj. La generalo ludis kun li! La generalo ŝparis lin por alia tago de sporto! La kozako estis la kato; li estis la muso. Estis tiam, kiam Rainsfordo sciis la veran signifon de teruro.

"Mi ne perdos mian trankvilecon. Certe ne."

Li malsuprengrimpis la arbon kaj iris denove en la arbaron. Lia vizaĝo estis serioza kaj li devigis sian mensmaŝinon funkcii. Tricent jardojn for de sia kaŝloko, li haltis tie, kie grandega mortinta arbo apogis sin malfirme kontraŭ pli malgranda vivanta arbo. Ĵetante sian sakon da manĝaĵo, Rainsfordo prenis sian tranĉilon el la ingo kaj komencis labori per ĉiu forto, kiun li havis.

La laboro finiĝis, kaj li kaŝis sin malantaŭ falinta trunko cent futojn malproksime. Li ne devis atendi longe. La kato venis denove por ludi kun la muso.

Sekvante la spuron, kun la certeco de sanghundo, venis generalo Zarof. Neniu eskapis de tiuj serĉantaj okuloj, neniu premita herbero, neniu tordita branĉeto, neniu signo, sendepende de kiom febla ĝi estis. Tiom diligente persekutis la kozako, ke li rimarkis tion, kion Rainsfordo faris antaŭ ol li eĉ vidis ĝin.

La piedo de la ĉasisto tuŝis la branĉon, kiu estis la baskulo de la meĥanismo. Eĉ se li tuŝis ĝin, la generalo antaŭsentis la danĝeron kaj retrosaltegis kun la lerteco de simio.

Sed li ne sufiĉe rapidis; la mortinta arbo, delikate alĝustigita por apogi sin kontraŭ la vivanta arbo, frakasiĝis kaj frapis la ŝultron de la generalo. Se ne estus pro sia vigleco, li estus platigita sub ĝi. Li ŝanceliĝis, sed ne falis; li ankaŭ ne faligis sian revolveron. Li staris tie, frotante sian ŝultron, kaj Rainsfordo, kun la koro denove premata de forta timo, aŭdis la ridon de la generalo sonori tra la ĝangalo.

"Rainsfordo," vokis la generalo, "se vi estas sufiĉe proksime por aŭdi mian voĉon, kiel mi supozas, lasu min gratuli vin. Ne multaj homoj scias kiel krei malajan homkaptilon. Bonŝance, mi ankaŭ ĉasis en Malako. Vi estas interesa, sinjoro Rainsfordo. Mi foriros nun por bandaĝi mian vundon; ĝi estas negrava. Sed mi revenos. Mi certe revenos."

Post ol la generalo foriris prizorgante sian kontuzitan ŝultron, Rainsfordo ekfuĝis denove. Estis fuĝo nun, senespera fuĝo kiu daŭris kelkajn horojn. La krepusko venis, tiam malheleco, sed li ankoraŭ iradis. La grundo malmoliĝis sub liaj mokasenoj; la arbaro iĝis forte densa; insektoj pikis lin sovaĝe.

Tiam, kiam li paŝis antaŭen, sia piedo dronis en la ŝlimo. Li provis retrotiri ĝin, sed la koto suĉis avide lian piedon kiel grandega hirudo.⁷ Kun perforta klopodo, li eligis sian piedon el la ŝlimo. Li nun sciis kie li estis. En la flusabloj de la marĉo de morto.

Liaj manoj fermiĝis strikte, kvazaŭ lia nervozeco estis io tuŝebla, kiun iu kaŝita en la malheleco klopodis eltiri el li. La moleco de la tero donis al li ideon. Li paŝis malantaŭen por eliri el la flusablo, pli-malpli dekdu paŝojn, kaj kiel granda prahistoria kastoro, li ekfosis.

Rainsfordo jam enfosis sin en Francio kiam unu-sekunda prokrasto signifis morton. Tio estis trankvila amuzaĵo kompare kun la nuna situacio. La truo pligrandiĝis; kiam ĝi estis super la ŝultroj de Rainsfordo, li elgrimpis kaj trovis kelkajn malmolajn arbidojn, kiujn li tranĉis kaj akrigis.

Ĉi tiujn palisojn li plantis en la fundon de la truo, kun iliaj pintoj elstarantaj. Li teksis krudan tapiŝon el herbaĉoj kaj branĉoj, kaj per ĝi kovris la buŝon de la truo. Tiam, malsekigita de ŝvito kaj trafita de laceco, li kaŭris malantaŭ la stumpo de arbo iam cindrigita de fulmo.

Li sciis, ke sia persekutanto venis; li aŭdis la malfortajn sonojn de piedoj sur la mola tero, kaj la nokta venteto portis al li la parfumon de la cigaredoj de la generalo. Ŝajnis al Rainsfordo, ke la generalo paŝis kun nekutima rapideco, metante unu piedon post la alia.

⁷ Anelido, kiu loĝas en sensalaj akvoj kaj nutras sin per sango elsuĉita el bestoj.

Rainsfordo, kaŝita tie, povis vidi nek la generalon, nek la truon. Tiam li sentis impulson krii pro ĝojo, ĉar li aŭdis la akran krakadon de la rompiĝantaj branĉoj dum la kovrilo de la truo frakasiĝis. Li aŭdis laŭtajn kriojn de doloro ĉar la pintaj palisoj trovis sian celon. Li eligis la kapon el sia kaŝloko. Tiam li kaŭriĝis denove. Tri futojn for de la truo, viro staris kun elektra poŝlampo en sia mano.

"Bone farite, Rainsfordo," la voĉo de la generalo vokis. "Via Birma tigrotruo prenis la vivon de unu el miaj plej bonaj hundoj. Denove vi gajnas poenton. Mi pensas, sinjoro Rainsfordo, ke mi vidos tion, kion vi povas fari kontraŭ mia tuta hundaro. Nun mi iros ripozi hejmen. Dankon pro ĉi tiu amuza vespero."

Je tagiĝo, Rainsfordo, kiu kuŝis proksime al la marĉo, vekigis per sono kiu sciigis lin, ke ekzistis pliaj lernendaj lecionoj pri timo. Ĝi estis malproksima sono, febla kaj fluktuantaj, sed li konis ĝin. Ĝi estis la bojado de hundaro.

Rainsfordo sciis, ke li povus fari du aferojn. Li povus resti tie, kie li estis, kaj atendi. Tio estus sinmortigo. Li povus fuĝi. Tio prokrastus la neeviteblaĵon. Dum momento li staris tie, pensante. Venis al li ideo kiu signifis iometan ŝancon, kaj li foriris el la marĉo.

La bojado de la hundoj venadis pli proksimen, tiam pli, pli, kaj eĉ pli proksimen. En montosupro, Rainsfordo grimpis arbon. Apud fluejo, ne pli malproksima ol kvarono de mejlo, li povis vidi arbuston moviĝantan.

Streĉante siajn okulojn, li vidis la maldikan figuron de generalo Zarfo; antaŭ li. Rainsfordo povis vidi alian figuron, kies vastaj ŝultroj forpuŝis la

altajn ĝangalajn herbaĉojn; estis la giganto Ivano, kaj ŝajne li estis tiritita de iu nevidebla potenco; Rainsfordo sciis, ke Ivano estis tiu, kiu tenis la hundaron per ligilo.

Ili alvenis tien post kelkaj minutoj. Lia menso laboris panike. Li pensis pri indiĝena truko, kiun li lernis en Ugando. Li glitis malsupren laŭ la trunko de la arbo. Li atingis elastan arbidon kaj fiksis sian ĉastranĉilon sur ĝi, kun la klingo direktita al la sekvenda vojo; per iom da vina vito li ligis la arbidon malantaŭen.

Tiam li kuris por savi sin. La hundoj laŭtigis siajn voĉojn kiam ili alvenis al la freŝaodoro. Rainsfordo sciis nun kiel sentas sin besto, kiu troviĝas alpremita al angulo.

Li devis ĉesi por spiri. La bojado de la hundoj ĉesis abrupte, kaj la koro de Rainsfordo ankaŭ haltis. La tranĉilo devis atingi ilin.

Li grimpis arbon ekscitita kaj rigardis malantaŭen. La ĉasantoj haltis. Sed la espero, kiun havis Rainsfordo kiam li komencis suprengrimpi, rapide mortis, pro tio ke li vidis en la malprofunda valo, ke generalo Zarfo estis ankoraŭ postiranta lin. Sed Ivano ne estis. La tranĉilo, impulsita de la repuŝo de la elasta arbo, ne tute malsukcesis.

Rainsfordo apenaŭ surteriĝis kiam la hundaro ekbojis ree.

"Trankvileco, trankvileco, trankvileco!" li anhelis dum li kuradis. Blua fendo montriĝis inter la trunkoj antaŭ li. La hundoj venis post li, ĉiam pli proksimaj. Rainsfordo devigis sin iri al tiu fendo. Li atingis ĝin. Estis la marbordo. Trans la golfeto li povis vidi la mornan grizan ŝtonon de la

vilao. Dudek futojn sub li, la maro bruegis. Rainsfordo hezitis. Li aŭdis la hundojn. Tiam li saltis en la maron...

Kiam la generalo kaj lia hundaro alvenis al la loko apud la maro, la kozako haltis. Kelkajn minutojn li staris tie, rigardante la bluverdan etendecon de akvo. Li levis la ŝultrojn. Tiam li sidis, trinkis brandon el arĝenta flakono, ekbruligis cigaredon kaj zumis iom el *Madame Butterfly*.

Generalo Zarfo manĝis tre bongustan vespermanĝon en sia grandioza manĝejo tiuvespere. Kun ĝi, li trinkis botelon da ĉampano *Pol Roger* kaj duonbotelon da ruĝa vino *Chambertin*. Du etaj ĝenoj malhelpis lian perfektan ĝuon. Unu estis la penso, ke estus malfacile anstataŭigi Ivanon; la alia estis, ke sia predo eskapis de li. Kompreneble, la usonano ne ludis la ludon – tion pensis la generalo, trinkante postvespermanĝan likvoron.

En sia biblioteko li legis la verkojn de Marko Aŭrelino, por trankviligi sin. Je la deka li eniris en sian dormoĉambron. Estis iom da lunlumo, do, antaŭ ol li ŝaltis la lumon, li iris al la fenestro kaj rigardis la korton. Li povis vidi la bonegajn hundojn, kaj kriis «ni estos pli bonŝancaj venontfoje» al ili. Tiam li ŝaltis la lumon.

Homo, kiu estis kaŝita inter la kurtenoj de la lito, staris tie.

"Rainsfordo!" ekkriis la generalo. "Kiel, nome de Dio, vi eniris ĉi tien?"

"Mi naĝis," diris Rainsfordo. "Mi trovis la domon pli rapide ol marŝante tra la ĝangalo."

La generalo tenis sian spiron kaj ridetis. "Mi gratulas vin," li diris. "Vi gajnis la ludon."

Rainsfordo ne ridetis. "Mi ankoraŭ estas besto alpremita al angulo," li diris en mallaŭta, raŭka voĉo. "Pretiĝu, generalo Zarofa."

La generalo faris unu el siaj plej profundaj riverencoj. "Mi komprenas," li diris. "Bonege! Unu el ni iĝos manĝaĵo por la ĉashundoj. La alia dormos sur ĉi tiu mirinda lito. Tenu vin garde, Rainsfordo." ...

Li neniam antaŭe dormis en pli bona lito, Rainsfordo certis.